
# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 5 (854) ✪ 2005

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;
✆ +46 (8) 52016816;
💻 dr_boarad@yahoo.se

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Dio tiel multe amas nin, ke ne estas 'SE' | 103 |
| Esperantistoj, esperigu esperantojn! | 105 |
| Pri la libereco de kristana homo | 106 |
| Venis letero | 107 |
| Anĝeloj kongrese kunvivantaj eliminas la homaron | 108 |
| La koncepto de homfrato ĉe Karl BARTH | 111 |
| La baloto en la Sveda Eklezio | 112 |
| Aliĝilo al KELI-konferenco 2006 | 113 |
| Bela knabino najbara | 117 |
| Raporto de la KELI-jarkunveno | 119 |
| Mi estas kiu estas - parto 5 | 122 |
| Feriaj kursoj en instituto Zamenhof | 123 |
| La profilo - Samuel Gaillard | 124 |
| Jen estas la vojo | 125 |
| Nekrologo - Arthur H. GARDNER | 127 |
| Kantiko de la kreitaro | 128 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

La frontbildo (fotis RACZKEVY EÖTVÖS Ágnes) montras la aŭtunon. Ĝi estas la sezono, kiu donas la plej diversajn sentojn al ni. Laŭ kelkaj ĝi estas ege bela, laŭ aliaj ĝia malhelo estas malgajiga, laŭ aliaj ĝi estas tro longa sen interrompaj festotagoj, ktp. Mi ŝatus karakterizi tiun ĉi numeron 'aŭtuna', ĉar ĝia enhavo estas ege diversspeca kaj ĉiu ajn certe trovas laŭplaĉe erojn interesajn, distrajn aŭ informajn. Tio bone montras la diversecon de nia legantaro, ĉar kontribuaĵoj venas el ĉiu direkto. Mi multe ĝojas pro tio kaj volas tiel ĉi esprimi mian dankon al vi, kiuj sendas al mi artikol(et)ojn. Vi tiel formas kune kun mi nian revuon. Mankas al mi tamen viaj pensoj pri 'Diservo', pri kiu mi jam petis.

# Dio tiel multe amas nin, ke ne estas „SE”

## Matena preĝo dum ekumena kongreso, Piliscsaba

Éva FARKAS-TATÁR, HU

Dankon pro la ripoziga nokto, la vekiĝo sana – la frateca etoso – komforta loko – la pasintvespera koncerto – tiom multe ni povas danki al Vi.



Tiuj ĉiuj estis dankindaj donacoj, sed ankaŭ Vi, Sinjoro scias, ke en nia interno nia vera plej forta deziro estas Vin mem renkonti, ekaŭdi Vian propran voĉon en la profundo de nia koro. Tion ni sopiras, tial ni frapadas pacience. Ni ja scias, ke pleje nia maltrankvila koro ne taŭgas por aŭdi Vian mildan, silentan voĉon. Indulgu nin kaj helpu nin humile malfermiĝi antaŭ Vi! Ni fidas je via propra promeso ke *„la Sinjoro donas sanktan Spiriton al tiuj, kiuj petas.*”

Venu Sankta Spirito kaj ektuŝu nin!

---

*Ni petas Vin, sankta Di-Spirit',*
*antaŭ ĉio pri la vera fid',*
*ke ĝi nin protektu je nia fino,*
*hejmen dum migros ni el ekzilo.*
*Kyrieleis*
[Adoru 352:1]

Nia kongresa temo ĉijare estas la libereco je kiu Jesuo Kristo liberigas nin el Epistolo al la Galatoj. Ni iom provu resumi tion, kio okazis en Galatio pro kio la apostolo Paŭlo skribis ĉi tiun severan eĉ koleran leteron.

La Galatoj kun ĝojo akceptis la simplan Evangelion kiel ili tion aŭdis de Paŭlo, sed poste venis aliuloj kiuj predikis al ili iun „alian evangelion”, kaj ili ekŝancelis.

### Kio estas la „simpla” Evangelio?

Pro la ofero de Jesuo Kristo, kaj en Jesuo Kristo mi povas rekomenci la vivon kiel filo de Dio, tiel ke ĉiuj miaj pekoj estas malantaŭen ĵetitaj: *„mi ne plu rememoros pri ili.”*

Kio estis „la alia”?

Jesuo Kristo plus miaj fortostreĉoj aŭ Jesuo Kristo plus sanktaj ceremonioj.

Ĉu estis mirinde ke la Galatoj ekŝancelis? Ni povas pensi ke JES – ja la Evangelio estas tiel simpla.

Sed samtempe ni povas pensi ke NE ĉar en la malfidema homa koro rapide ekas la ideo, ke ĉio nur tiam estas certa, se ankaŭ mi faras ion por tio.

Tiu „alia evangelio” estas danĝera nocio. Paŭlo ne batalis kontraŭ la ateistoj. Tiujn li ne trovis tiom danĝeraj. Tute simpligite tiu „alia evangelio” tion

diras al ni: Dio amOS vin (en la futuro) tiam, SE…

– se vi sufiĉe profunde pentofaras (ĉu vi vere rekonas eĉ viajn malbonajn pensojn?)
– se vi rekompencas ĉiujn, kiuj havis ĉagrenon pro via konduto
– se vi entreprenas eĉ sensencajn suferojn por plaĉi (!) al Dio

La Evangelio tion diras al ni: Dio amAS vin NUN, TIA KIA vi estas.

Do, malkaŝu vian tutan vivon antaŭ Lia Graco!

*Vi nobla lum', brilu Vi en ni,*
*ke ni Kriston konu pli kaj pli,*
*ke ni ne forlasu Lin, la Savanton,*
*kiu nin portis en la hejmlandon.*
*Kyrieleis*
[Adoru 352:2]

En la rezulto montriĝos granda diferenco laŭ tio, kio estas la bazo de nia kristana vivo.

1 Se la Graco kreskigas min, mi interkomunikas kun mia Kara Patro (Abba) – la sankta Spirito gvidas min al plenaĝeco – decidkapablo – libereco.
2 Se mi trovas decidaj miajn religiajn fortostreĉojn, - atingojn, direktas min la angoro; se mi ne plenumis la leĝojn, Dio ne amas min – tio retenas min en la neplenaĝeco, sklaveco.

Tion sciante Paŭlo koleras: Vi povus ricevi Diajn – ĉielajn fortojn, anstataŭ tio vi reiras al la homaj fortostreĉoj!

Ni devas klare distingi la vortojn *alia* kaj *alie*. Povas esti pluralismo en la disvastigo de la Evangelio. Oni povas alimaniere – ALIE praktiki, servi, transdoni la Evangelion.

Ekzemple
liturgie - Taizé
diakonie - Patrino Tereza
karizmatike - pentekostanoj
revolucie – sud-amerikaj pastroj

Sed ne ALIAN Evangelion!

Nia atesto pri la Evangelio estu tute klara: Dio tiel amas nin, ke poste ne estas „SE".

Nia (akuzema) koro povas demandi: kie restas tiam „la bonaj agoj". Jes, la bone kreskantaj plantoj havas siajn fruktojn, eĉ tiuj bonodoraj floroj kaj bongustaj fruktoj estas signoj de nia sana kristana vivo. Sed ili devenas el la dankema koro kies certeco estas en la kredo: mia ĉiela Patro amas min senkondiĉe.

*Regalu nin, dolĉa amfavor',*
*ke fervore ardu nia kor',*
*ke la karitato sur tero estu'*
*unu en paco ĉiam ni restu.*
*Kyrieleis*
[Adoru 352:3]



# Esperantistoj, esperigu esperantojn!

Jacques TUINDER, NL

Tiel sonis mia 'krio de koro' en 1966 - do preskaŭ antaŭ kvardek jaroj - kiam mi klopodis inviti 'nian diligentan kolegaron' aliĝi al la batalo kontraŭ nenecesa vidhandikapeco. Kadre de la Unua Ekumena Esperanto-Kongreso, okazinta en Limburg/Lahn, la partoprenintaro rezoluciis favore al tiu kampanjo esperantista. Laŭ freŝdataj statistikoj oni konsciigas la vidantojn, ke en la mondo estas cirkaŭ 40.000.000 da blinduloj, el kiuj tri el kvar estas tute nenecese aŭ senbezone vidhandikapitaj. Eblas preventi kaj kuraci la plej grandan parton de la blindeco en ekonomie malfortaj landoj!

Ankaŭ la ĉijara ekumena kongreso kontribuis malavare al la projektoj de la organizaĵo, kiu ne plu kiel komence nomiĝas Agado E3, sed Fondaĵo Evidente (E-vid-E-nt-E). La redaktoro de "Dia Regno" petis al la iniciatinto-prezidanto fari liston de landoj kaj aktivaĵoj. Jen ĝi sekvas, laŭ alfabeta ordo kaj iom telegramstile:

- **Acoroj**: keramikforno por hejmo kun pluroble handikapitaj infanoj;
- **Albanio**: optikista kaj okulista misioj, starigo de tri optikejoj, multforma helpo al instituto por vidhandikapitaj infanoj, i.a. muziksalono, renovigo de internulejo kaj brajlopresejo;
- **Brazilo**: oftalmologiaj instrumentoj;
- **Bulgario**: renovigo de Rekapabliga Centro, brajlopresejo kaj diversaj laborprojektoj):
- **Etiopio**: instrumenta helpo al Okulcentro;
- **Ganao**: materia subteno al la plej granda optikejo en la mondo;
- **Hindio**: helpo al du oftalmologoj per instrumentoj;
- **Kamerunio**: konstruado de kompleta okulkliniko kvardeklita kun propra operacia ĉambro por la okulisto;
- **Kenjo**: veturanta okulkliniko kaj diversmaniera helpo al ekzistanta okulhospitalo;
- **Kosovo**: kompleta brajlopresejo;
- **Malavio**: veturanta okulkliniko;
- **Maroko**: esenca helpo al enlernejigo de du denaske blindaj infanoj kaj postaj projektoj por komenciĝanta instituto;
- **Moldavio**: optikista kaj okulista misioj, ankaŭ en prizonoj, renovigo de etaĝodomo por familioj kun unu aŭ pluraj vidhandikapitaj anoj;
- **Nikaragvo**: brajlopresejo kaj revalidigaj projektoj;
- **Rumanio:** optikista misio kaj

brajlopapera sponsorado al porblindula instituto;

- **Srilanko**: optikista misio, konstruado de porblindula lernejo; pligrandigo de hejmo por blindaj infanoj;
- **Suda Afriko**: oftalmologiaj instrumentoj;
- **Taĝikio**: optikista misio, ankaŭ en prizonoj, helpo al starigo de dua blindulejo, brajlopresejo;
- **Ukrainio**: optikista misio.

Ni helpis per okuloperacioj al pacientoj en Albanio, Bulgario, Eritreo, Moldavio kaj Pollando.

Ofte ni sendas laŭreceptajn okulvitrojn al bezonantoj en landoj kiel Benino, Madagaskaro, Maroko, Rusio. Serbio, Tanzanio, Togo, k.a.

La plej grandaj sponsoroj estas: la nederlanda registaro, Fondaĵo Sovaĝaj Anseroj (Wilde Ganzen), revendejoj, monakejoj, servokluboj (Rotary, Leons, Round Table, k.a.), komunumo Heemskerk,

Se esperantistoj pretas - laŭ la spirito de okulisto D-ro L.L. Zamenhof kaj kiel eksterigo de 'la interna ideo' - sponsori la kampanjon de KELI-membro kaj -estrarano, ili turnu sin al:

Fondaĵo Evidente,
Henegouwenlaan 35,
NL 1966 RH Heemskerk
Nederlando

(poŝtbanka konto: 10.20.100, menciu: Stichting Zienderogen, Heemskerk)
aŭ UEA-konto: jajt-ts.

Multan dankon!

# Pri la libereco de kristana homo

*Kara redaktoro, preparante mian prelegeton en Piliscsaba mi ja multe legis pri la reformacio i.a.* PRI LA LIBERECO DE KRISTANA HOMO.

En ĉi tiu libreto Martin Luther 1520 esprimis la sumon de kristana vivo. Kaŭzo estis la anatema buleo de la Papo kontraŭ li, kiu siaflanke kondamnis la tiaman Papon kiel antikristanan. La libreto enhavas la "kristanan bazleĝon". Luther sumigas ĝin en du artikoloj:

1 Kristana homo estas libera mastro super ĉiuj aferoj kaj nenies subulo.

2 Kristana homo estas servema servisto de ĉiuj aferoj kaj ĉies subulo (vidu ankaŭ 1. Kor 9:16; Rom 13:8).

Ĉar tiutempe temis ankaŭ pri la pravigo kaj la indulgenco, Luther akcentas nur la kredon al Kristo. Bonaj faraĵoj ne kreas bonan, pian homon, sed bona homo faras bonajn, piajn faraĵojn. Kristano ne vivas en si mem, sed en sia proksimulo; en Kristo pere de la kredo kaj en sia proksimulo pere de la amo.

Siegfried KRÜGER

# Venis letero

**Estimata Sinjoro Redaktoro,**
mi ne estas abonanto de "Dia Regno", sed, pere de nia hungara samideanino Irén BAGI, mi ricevis ekzempleron, kiu entenis aliĝilon por la lasta ekumena kongreso en Piliscsaba.

En tiu revuo, mi povis legi interesajn artikolojn skribitajn de konatoj, kiujn mi havis la plezuron renkonti poste okaze de la kongreso: interalie Philippe COUSSON kaj Siegfried KRÜGER.

Mi ankaŭ legis la 'informetojn' de la lasta paĝo. En la lasta artikolo troviĝas vorto, kiu miaopinie ne estas gramatike ĝusta. Temas pri la vorto 'gekaraj'. En la L.I. [lingvo internacia] ne estas gramatikaj genroj, kiaj ekzistas en multaj eŭropaj lingvoj, sed indiko de sekso por homoj kaj bestoj.

Por tio utilas la prefikso 'vir' kaj la sufikso 'in', kiujn oni aldonas al nomo (substantivo) de homo aŭ de besto.

**Sume:**
–'Vir + (nomo de seksohava estaĵo) + finaĵo'; ekz.: virkapro, virkapraj kornoj.
–'(Nomo de seksohava estaĵo) + in + finaĵo'; ekz.: kaprino, kaprina lakto, kaprine salti.

La prefikson 'ge' oni ankaŭ povas aldoni al nomoj de homoj aŭ bestoj, kiuj konsistigas ambaŭseksan grupon.
–'Ge + (nomo de seksohava estaĵo) + finaĵo'; ekz.: gepatroj, geedza paro, gefrate sin ami.

Kiam oni diras al iuj personoj; 'Miaj karaj', tiuj personoj ja scias, ke temas pri ili. Do ne necesas diri 'gekantistoj', 'gesamklubanoj'. Eĉ la vorto 'geamikoj' ne estas nepre bezona, ĉar la vorto 'karaj' jam montras amikecon.

Sed la adjektivo, kiun oni uzas por alparoli ilin, kaj kiu indikas econ sed ne identecon ( kiaj sed ne kiuj ili estas), ne povas ricevi seks-indikan afikson.

Pro tio, laŭ mi, jenaj frazoj estas kondamnindaj: 'Mia karina, mia belina...', 'Miaj gekaraj, miaj gebelaj...'

Se la fakto, ke la alparolataj personoj estas karaj, estas por ni tiel grava, ke ni volas doni al ili nomon por montri tion, tiam oni diru 'gekaruloj', ĉar tiel oni nomas ulojn kaj ulinojn karakterizitajn per tio, ke ili estas karaj.

Sammaniere oni diras: 'mia amata' uzante adjektivon, kaj 'mia amatino' uzante substantivon, sed neniam 'mia amatina'.

Mi esperas, ke ĉi tiuj gramatikaj rimarkoj ne tro tedos vin.

Mi ĝojas, ke mi konatiĝis kun vi en la lasta ekumena kongreso, kaj fratece salutas vin.

Daniel CHEVALIER



# Anĝeloj kongrese kunvivantaj eliminas la homaron!

Armando ZECCHIN, IT

Abrupte plonĝis en min deziro rakonti eventaĵon, ĵus naskiĝintan el mia nedresebla fantazia impulso. Eble ĝi temas pri fakto, eble ĝi estas novelo, eble ĝi entenas ion instruan oni juĝu.

En bela kaj admirinda urba renkontejo mi estis aŭskultanta la prelegon de ege instruita predikanto-teologo, kiun de longe mi deziris aŭdi perorele, krom raditelevide aŭ lege en disvastigitaj kaj famaj revuoj. Li eldiras klare kaj fascine, konsekve ligante kaj deduktante la pensojn unu de la alia, en lingvo terminriĉa kaj vortpreciza.

Certan momenton lia parolado forflugis sur la temo "anĝeloj": anĝeloj kiuj estas mesaĝistoj de Dio, kiuj en la Biblio foje identiĝas kun Dio mem, pri kiuj ni fabelas ĝis ilin dividi en kategorioj, en ĥoroj kaj igis ilin niaj asistantoj... Jen la flago de la dubo lanĉita preskaŭ hazarde: *"Kaj se ili estus frukto de nia devoteca fantazio kiu preferas renkontiĝi kun liaj mesaĝistoj anstataŭ kun Dio rekte kaj senproparolante?"* Jen preta la teologo, kulturantropologie vestita, por pruvi la dubon fundita.



Eble (li enŝovas) *"ni estas regataj de la sama timo jam konigita de antropologio kaj psikologio laŭ kiu Dio estas la sanktaĵo timiganta, altiranta kaj minacanta alproksimiĝanton al Li; tial konvenas Lin atingi nerekte, nur pere de liaj proparolantoj. Kaj funde oni ne komprenas kial Dio bezonus helpantojn. Pro tio jam famaj teologoj dubas pri anĝelara reala ekzisto kaj interpretas ties enbibliajn manifestiĝojn kiel seninstruajn metaforojn kaj, tial, kiel intervenojn de Dio mem maskita malantaŭ la anĝela vizaĝo. Konvenas pensi ke ne anĝeloj agas sur ni (kiel la gardantaj fikciaj anĝeloj), konvenas ke ili, ĝuste en niaj kredaĝo kaj korinklino, lasu la lokon al Dio mem. La kristano, konklude, ne obeu tiukaze al sia emo elvoki ĉiumomente proparolantojn kvazaŭ Dio estus fora kaj nealproksimebla!"*

Antaŭ tiaj enŝovaĵoj en mi ekfajreris la tento pri tiu ĉi noveleto: la anĝeloj kunvenas por diskuti pri io grava, io kompromitinta ilian dignecon, ilian unikecon en la ordo de la kreitaro. Tio okazis en la ko-

> " la anĝeloj kunvenas por diskuti pri io grava, io kompromitinta ilian dignecon, ilian unikecon en la ordo de la kreitaro.

menco de la homa vivhistorio kiam sur la tero la evoluo apenaŭ ekevoluis en la homon laŭ la programitaj diaj projektoj; plejekzakte, okazis kiam la homoj ekmovis la unuajn paŝojn kaj ekplanis sian pluevoluan civilizon. Okazis ke anĝeloj, distriĝantaj, flugante sur la universo kreita, ektravidadis, krom si mem, la vastegan ĉielon kun senfinaj steloj kaj sur iu loko, nomata tero, kreaĵojn sinmovantajn kaj ĝenerale multipliiĝantajn, sed neniu el tiuj mirindaĵoj paroladis, rezonadis, kreadis artaĵojn: sume aĵoj preskaŭ senlime malsuperaj kompare kun la anĝela digneco. Kiel sciate, la anĝeloj dividiĝis en kategorioj unu pli supernature dotita ol la alia. Pri tiaj dotaĵoj ili orgojlis same pro ilia kontinua familiareco kun Dio: nur ili povis kompreni kaj laŭdi la dian majeston!

Okazis. Eble devis okazi. Okazis eksterordinara evento renversanta mondparadizan vizion de la anĝelaro: iuj anĝeloj, ĉiam distriĝemaj, tie kaj tie superflugante la belegan teron tra arbaroj... birdoplenaj kaj maroj... fiŝoplenaj, kredis travidi, en iu plaĝo, ion novan: nova estaĵo surdupiede stare promenadis sur la tera surfaco: Kreaĵo kiu paroladis, sin esprimadis logike, obeadis al io kiu ne estas la instinkto malsame ol la kutimaj bestoj. Ilia surprizo fariĝis pli akra kiam ili kredis kompreni ke la nova estaĵo kapablas rezonadi kaj adresi siajn pensojn kaj preĝojn al Dio mem, eĉ konstrui domojn aŭ kabanojn por adorkliniĝi al Li!

Aliaj anĝeloj superflugis la saman planedon aliloke por rekonfirmiĝi, aŭ



dementiĝi, en la suspekto, horora suspekto! Ĉu respektus la dignecon de anĝela naturo kreaĵo tia kiu kapablas pensi en bestaj aspekto kaj karno?

Sed la sennombra amaso de la anĝeloj, referencianta pri la novaĵo, ne volis kredi tion, eĉ opiniis ke la esplorintaj anĝeloj falis en eraron ĉar estaĵo tia kontraŭracias. Diskutoj, opinioj malsamaj, kontrastoj kaj... luktoj (nur vortaj, certe). Kromaj misioj rekonfirmis la suspekton: “eble aperis nova stranga kreaĵo iom simila al ni!”

En la diskutmezo falis propono, normala propono kvankam neniam okazinta inter tiaj ĉielloĝantoj: “ke la anĝeloj kongresu por klarigi ĉu okazas, eĉ ĉu povas okazi, ke jam ekvivas estaĵo duonbesta-duonanĝela!”

Jen la kerno de la novela fantaziaĵo. La anĝeloj renkontiĝis en la ĉielaj spacoj, aŭskultis prelegojn, referaĵojn, klarigojn, filozofiaĵojn, teologiaĵojn, poemajn laŭdojn al Dio kiu kreis senfinan varispecan bestaron kaj la inteligentan, superinteligentan anĝelaron! Post longa atenta, ĉionesploranta anal-

izo, ili elmetis konkludon, solenan konkludon, validan por ĉiuj anĝelaj kategorioj kaj ĥoroj. La konkludo estis aprobita unuanime: eĉ la esplorintaj anĝeloj rezignis siajn impresojn kaj konsentis kun ĉiuj.

La konkludo sentencis: “Ne eblas ekesto de estaĵo duonbesta-duonanĝela, ĉar la koncepto mem kolizias tra siaj partoj. Krom neebla, ĝi taksendas ankaŭ senmotiva, sencela, senutila, eble malutila: Dio ne bezonas similajn estaĵojn! Por realigi liajn planojn provizas ni! Kaj se ververe Dio tion konceptis kaj ekprojektas realigi, ni humilaj liaj tutspiritaj servantoj konsilas ke Li tion ne faru! Fakte, jam ekzistas tute brile kreaĵoj tute bestaj kaj estaĵoj tute inteligentaj-spiritaj. La universo videbla kaj nevidebla estas kompleta, jam finita!”

> ” La konkludo sentencis: “Ne eblas ekesto de estaĵo duonbesta-duonanĝela, ĉar la koncepto mem kolizias tra siaj partoj...”

La anĝeloj unufraze eliminis la homon kaj eblon mem pri homaro! Homo ne estas bezonata, eble nekonceptebla!

Post la prelego mi iris al la prelega podio por rakonti al predikanto mian fantaziaĵon miamense ekfajrerintan ĝuste dum lia parolado. La teologo pacience aŭskultis en scivolema silento la tutan rakonton, kaj kun grava teniĝo saĝige komentis: “jes, ja: ĉu Dio decidis krei anĝelojn post aŭskultinte la homajn komentojn kaj obĵetojn? Ĉu ni rajtas dedukti el niaj rezonadoj tion kion reale Dio povas krei kaj reale kreis? Ĉu ni homoj estas riskantaj pensi pri anĝeloj kion ili, kongrese konvenintaj, erarege pensis (kaj naivdedukte pretendis) pri la homo?”

Ho forto de noveloj! Ĉu eblas ke ni savu, ĉe racionalismaj teologoj almenaŭ la tutspiritan Di-adorantaron, se ne ankaŭ niajn gardantajn anĝelojn? ☙

### LA REGNO DE DIO

Kaj oni venigis al li infanojn, por ke li tuŝu ilin; kaj la disĉiploj admonis ilin. Sed Jesuo, vidinte tion, indignis, kaj diris al ili: Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio. Vere mi diras al vi: Kiu ne akceptos la regnon de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝin. Kaj li prenis ilin en siaj brakoj, kaj benis ilin, metinte la manojn sur ilin.

Mar 10:13-16

# La koncepto de homfrato ĉe Karl BARTH

Zoltán SOMHEGYI, HU

Mi supozas ke ĉiuj protestantaj kaj eĉ multaj aliaj kredantoj bone konas la nomon de la fama teologo Karl BARTH (1886-1968). Lia grava verko, la Eklezia Dogmataro (Kirchliche Dogmatik) aperis en pluraj lingvoj, kaj eĉ ĝis hodiaŭ estas menciita kaj diskutata inter la teologoj.

Sed, en tiu ĉi artikolo mi ŝatus paroli nur pri parto de lia dogma sistemo: pri la parto kiu rilatas al lia koncepto pri la kun-estado de homoj. Tio aperis ankaŭ en aparta libro: Homo kaj homfrato (Mensch und Mitmensch).

BARTH komencas sian pensadon kun Jesuo, kiu laŭ li estas homo por homoj, kaj samtempe tiel perfekta reprezentanto de Dio, kiel neniu alia homo kapablas esti. Tamen la Homo-Jesuo estas por la homo. Tiamaniere Dio mem fariĝis homfrato por la homo. Tio ankaŭ tion signifas, ke homeco kaj humaneco ne eblas sen aliaj homfratoj. Humaneco estas humaneco de homo, do, la destino de homo estas la kun-estado kun la alia. Se la homo estas sola, ne povas plenigi sian taskon: esti tiu, por kiu Kristo venis, kaj fariĝi alianculo de Dio.

Se ni akceptas tiun humanecon, tio aperas ankaŭ en nia komunikado: se mi pensas aŭ diras „mi”, tio aŭtomate signifas, ke la alia estas „vi”. Tiu „vi” ne povas kaj ne rajtas esti „li”. Se mi diras „li”, tio signifas, ke mi ankoraŭ ne atingis la bezonatan proksimecon, kaj „li” ankoraŭ estas „ĝi” por „mi”.

Sed tio estas jam alia pruvaĵo por la ideo jam menciita: mi ne povas diri „mi”, sen pensante, ke ekzistas „vi”. Se mi ne pensas pri la „vi”, mi estas malhumana.

> Humaneco ankaŭ signifas esti helpema por la alia. Tamen, tio ne signifas vivi lian vivon, aŭ iamaniere anstataŭi lin se okazas malfacilaĵoj, ... Sed esti proksime, helpi lin kun niaj fortoj ni ĉiuj kapablus.

Alikaze, laŭ BARTH, la frazo „mi estas” signifas: „mi estas en renkontiĝo”. Kaj tio estas la esenco de humaneco: ke mia ekzisto estu en renkontiĝo kun via ekzisto. Alimaniere dirante: „mi estas, se vi estas”.

Tial la homa vivo ne estas pasiva, sed aktiva esenco. Ni ne estas, sed ni ekzistas. Kiu diras homo – diras io okazas. La loko de tiu okazaĵo estas la kreita mondo, kaj ties formo estas la parolado. La interparolado estas intereso de ambaŭ, ĉar ni estas unu por la alia. Ni estas homfratoj.

Humaneco ankaŭ signifas esti helpema por la alia. Tamen, tio ne signifas vivi lian vivon, aŭ iamaniere anstataŭi lin se okazas malfacilaĵoj, ĉar vivi centprocente por la alia homo ne kapablas, nur Dio. Sed esti proksime, helpi lin kun niaj fortoj ni ĉiuj kapablus.

La plej grava, kaj la plej malfacila nivelo de la renkontiĝo estas ke ni renkontu la alian kun ĝojo. Se mi ĝojante estas homfrato por mia homfrato, mi ĝojante helpas lin, kaj akceptas lian helpon.

Tamen ni ne devas forgesi nian liberecon. Mi havas kun-vivantojn, kiuj, se ili volas, povas fariĝi miaj homfratoj, sed ili ne dependas de mi, kaj mi ne rajtas dependi de ili. Se estas dependeco, ne estas libereco, kaj ni ne povas esti kune ĝojante. La alia homo povas esti mia homfrato nur se li ne *devas*, sed *elektas* kaj akceptas. Se tio bone funkcias, ni estas donacoj unu por la alia. ☙

---

# La balotado en la Sveda Eklezio

Bengt Olof ÅRADSSON, SE


Iom strange estas por kelkaj niaj eksterlandaj geamikoj la sistemo de la Sveda Eklezio per granda balotado trovi reprezentantojn al gravaj decidaj grupoj: la paroĥa deputitaro, la eparĥia deputitaro kaj la nacia sinodo.

Ĉi-jare okazis tiu balotado la 18an de septembro 2005. Ĉiun kvaran jaron tio okazas. Ĉiu membro de la eklezio kiu estas pli ol 16 jara havas la rajton partopreni kaj tio signifas proksimume 5,8 miljonojn da personoj. El tiuj kutime 10-15% voĉdonas.

La bazo por trovi la estontajn reprezentantojn estas kutime la jam ekzistantaj politikaj partioj. Sed ankaŭ aliaj grupoj formiĝas, eble nur unufoje sed plej ofte pli longdaŭre. Povas esti ke la lokaj politikaj grupoj, aŭ aliaj interesuloj, ene de la Sveda Eklezio serĉas kunlaboron anstataŭ la kutima konfrontiĝo kaj pro tio ili formas apartan grupon por la loka elekto. Ĉi-jare tiuj 'nepolitikaj' grupoj fortiĝis.

En la medio oni post la balotado diskutis pri la nova situacio ke partio, kiun la plej multaj personoj opinias rasista kaj netolerema, ekhavis reprezentantojn en malmultaj paroĥoj.

Dum pli ol 400 jaroj, la Sveda Eklezio kaj la ŝtato estis firme ligitaj, sed depost 2000 la Sveda Eklezio estas unu eklezio inter multaj aliaj. ☙



Fotis Jim Elfström/IKON

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

# ALIĜILO

al la kristana kongreso
(56-a kongreso de KELI, Horský domov STRÁŽNÉ, Ĉeĥio)
12. – 19. 8. 2006

Familia nomo: ................................................................ (skribu MAJUSKLE)

Persona nomo: ................................................................ (skribu minuskle)

Adreso:
Strato: ................................................................
Urbo: ................................................................ (inkl. la poŝtkodon)
Lando: ................................................................
Telefono: ................................................................
Faksilo: ................................................................
Retadreso: ................................................................

Mi mendas ĉambron: (___) unu-litan, (___) du-litan, (___) plur-litan

Mi preferas loĝi kun: .......................................................

Mi estas vegetarano: (___) JES (___) NE

Dato: ..........................................

Subskribo: ................................................................

Notoj de LKK:

La aliĝilon sendu al:
Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Telefono kun faksilo: 420 325 615 651
E-mail: cea.polnicky@quick.cz

**Organizaj informoj:**

Mi estas preta gvidi ĉiutagajn preĝojn - JES / NE

Mi povus prelegi pri : ..............................................................................

Mi postulus (specialajn dezirojn): ..................................................................

......................................................................................................................

Mi alveturos: trajne / aŭtomobile

kiam (proksimume): ..................................................................

......................................................................................................

**El provizora programo:**

- oficiala malfermo de la kongreso
- interkona vespero
- diservo kun sankta manĝo
- prelegoj, kantado, dancado
- koncertoj
- jarkunveno de KELI
- tuttaga busa ekskurso al montara centro HARRACHOV
- duontaga ekskurso – pieda kaj busa (detalajn informojn pli poste)

# INVITO al KRISTANA KONGRESO
# (56-a kongreso de KELI)
# 12. – 19. 8. 2006
# STRÁŽNÉ, Ĉeĥio

La kristanan kongreson organizas KELI, sed partopreni povas ankaŭ IKUE-anoj kaj ĉiuj aliaj esperantistoj, kiuj volas ĝui kristanan medion.

**"H O R S K Ý  D O M O V" (Montara hejmo)**

en STRÁŽNÉ (770 m super marnivelo) troviĝas en la montaro KRKONOŠE, (ĉe la limo kun Pollando) sur la suna deklivo, de kie estas bone videblaj montoj ŽALÝ kaj KOTEL. La tuta komforta ripozejo estas uzebla tutjare por refreŝigaj restadoj, seminarioj kaj kursoj. Ĝi apartenas al Evangelia Eklezio de Bohemia Kunfrataro

STRÁŽNÉ estas ĉarma montara loko proksime de Vrchlabí, kiu estas atingebla buse, trajne kaj aŭtomobile (parkejo rekte ĉe la kongresejo).

La ripozejo konsistas el la ĉefa domo "HORSKÝ DOMOV", nove konstruita post incendio, malpli grandaj domoj "VILKA" kaj "VOKURKA" kaj secesia preĝejeto.

En "HORSKÝ DOMOV" estas 1 - 3 litaj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo. Entute estas 21 litoj. En la domo troviĝas manĝejo por 80 personoj kaj bufedo.







"VOKURKA" ebligas loĝadon de 16 gastoj en 2 - 3 litaj ĉambroj kun propra duŝo kaj necesejo.



"VILKA" kun 30 lokoj en 2 – 4 litaj ĉambroj. Duŝoj kaj necesejoj komunaj.



Tuj apude estas eleganta secesia preĝejeto.

Ĉirkaŭe estas tipaj montaraj kabanoj kaj vilaĝdomoj taŭge lokitaj en belega naturo. Tie Vi povas trankvile promeni kaj ripozi.

Ni sincere invitas Vin partopreni KRISTANAN KONGRESON (56-a kongreso de KELI), kiu okazos en la tagoj 12. – 19. 8. 2006 en "HORSKÝ DOMOV" en montara vilaĝo STRÁŽNÉ (Ĉeĥio).

Pliajn informojn donos al Vi kaj aliĝilojn akceptas:
Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Telefono kun faksilo: 420 325 615 651
E-mail: cea.polnicky@quick.cz

La aliĝo validas nur post la pago de la aliĝkosta sumo

| | **Aliĝkosto** ĝis 31.12.2005 | ĝis 31.3.2006 | post 1.4.2006 | **Restadkosto** |
|---|---|---|---|---|
| Kategorio A : | € 10 | € 20 | € 30 | € 110 |
| Kategorio B : | € 30 | € 40 | € 50 | € 220 (270)* |

Rimarku: Sumoj en EURoj

* unulita ĉambro

Kategorio A: ekssocialismaj landoj, Afriko, Sudameriko
Kategorio B: ĉiuj aliaj landoj

Monsendoj de monbiletoj (EUR) per registrita letero al Pavel Polnický.
Se eblas, uzu UEA-poŝtĝirkonton aŭ pagu prefere al UEA por konto KELK-P de KELI.

# Bela knabino najbara

MU Bingua, Ĉinio

Baldaŭ kiam mia familio alvenis al la pensiono por loĝi, mi trovis, ke en la najbara familio vivas pli-ol-20-jara knabino tre bela. Ŝia nomo estas Juhong. Ŝi laboras en malgranda butiko kaj post sia laboro tre ŝatas literaturon.

Antaŭ pordego de la pensiono mi unuafoje renkontiĝis kun Juhong. Ŝi belis tiel, ke mi senkonscie rigardis sur ŝin dum momento. Vidinte tion, mia edzino havis facile rimarkeblan ĵaluzon sur la vizaĝo. Ŝi estis iom konfuzita. Mi ridetis en mia koro kaj ŝercis pri ŝi dirante: ”Ne timu! Kvankam via edzo amas belan knabinon, tamen li ne emas diboĉon.”

Ni konatiĝis kun la bela knabino pro nia filo. Iun nokton, subite la 3-jara filo sentis ventrodoloron. Ni devis senprokraste porti lin al hospitalo. Sed, hazarde, en la hejmo mankis kontanta mono; pro tio mi kaj mia edzino maltrankviliĝis. La bela knabino aŭdis nin, kiuj brue konsiliĝis unu kun la alia. Frapinte sur la pordo, ŝi eniris en la ĉambron kun mono en la mano, kaj diris al ni: ” Jen mono. Tuj al hospitalo!”

En la sekvanta tago, la edzino venis al la malsanula ĉambro en la hospitalo kaj min anstataŭis por flegi la filon. Ŝi alportis ankaŭ la fruktojn kiujn Juhong aĉetis por nia infano. La edzino kelkfoje laŭdis Juhong, ke ŝi vere estas bonkora knabino. En tio ni plene komprenis la sencon de la proverbo; pli bona estas najbaro proksima, ol frato malproksima.

Pli poste, laŭ la invito ni ĉeestis en la nupto de iu amiko. En la balo ni neatendite vidis Juhong. Ŝi alpaŝis al ni kaj salutis mian edzinon. Ili interparolis afable. Post momento, ŝi invitis min al dancado. La edzino ne nur ne ĵaluzis, sed eĉ laŭdis, ke ni ambaŭ estas bona paro da gedancantoj.

Post nelonge Juhong estis partoprenonta en iu kunveno pri literatura verko. Ŝi petis de mi, ke mi helpu ŝin korekti manuskripton por prelego. Tiutage en la libroĉambro mi korektis la manuskripton kune kun Juhong dum la tuta posttagmezo. Mia edzino ne eniris en la ĉambron kaj nur ekster la ĉambro, de tempo al tempo, laŭte atentigis min: ”Bone helpu ŝin korekti, se poste ŝi meritos premion, tio ankaŭ estos nia honoro.” La edzino faris abundan vespermanĝon por regali Juhong. Dum la manĝado la edzino plurfoje kaj kompleze proponis al ŝi frandaĵon, cetere la edzino lasis nian filon nomi ŝin eta onjo. Ili estis tiel intime, kvazaŭ ili estus veraj du fratinoj.

Dum la mallongaj kelkaj monatoj, tiu ĉi bela knabino, kiu iam konfuzis mian edzinon, tamen fariĝis nia bonkonato. Ŝi tre ofte vizitis min por babili pri literaturo. Mi konfesas, ke dum mi estis kune kun Juhong, mi

sentis min tre plezura. Juhong aldonis al mia banala vivo multajn freŝajn kolorojn. Mi devas danki mian karan edzineton, ĉar ŝi estis grandanima, kaj povis bone trakti Juhong kiel sian amikinon.

Pasis duonjaro. Foje mi oficvojaĝis en sudan Ĉinion. Tie mi restis tri monatojn. Post kiam mi revenis de la sudo al la hejmo, mi mire vidis, ke nia najbaro jam estas alia mezaĝa virino. Oj! Bela knabino Juhong translokis sian hejmon. Kie do ŝi nun estas? mi demandis al mia edzino. La edzino jam ne havis antaŭan ĝentilecon. Kaptante min je la orelo, ŝi mokis min: “Strange. Ĉu vi sopiras ŝin?” Ŝi neniel sciigis min pri ŝia nova loĝloko.

Fakte, profitante la ŝancon, ke mi estas for de la hejmo en la tri monatoj, la edzino entuziasme prezentis al Juhong oficiron junan kaj bravan. Ŝi multe helpis la knabinon per tio, ke ŝi lerte estis svatantino. Juhong fianĉiniĝis al li, kaj sekvante lin aliris al lia hejmo.

En tiu nokto post mia reveno, mi estis sendorma. Mi ŝaltis la tablolampon, kaj iom plifortigis la prilumon. Mi elprenis libron kaj laŭdezire ĝin foliumis. Subite, vico da frazoj saltis en miajn okulojn kaj trudis sin al mi, nome: *La virino laŭ sia esenco de naturo estas politikisto pri familio, kaj geedzeco laŭ sia esenco estas unu speco de privata posedsistemo*.

Mi eksentis grandan teruron. Mi turnis min al la edzino, kiu dormegis apud mi, rigardis ŝin ronketantan kaj ja vidis, ke ŝia vizaĝo montriĝas kaj dolĉa kaj kontenta. ☙

---

Estimata redaktoro... Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis la revuon ”Dia Regno” n-ro 3, 2005. Mi jam tralegis grandan parton el ĝiaj artikoloj. Inter la artikoloj ”Sekretaria jarraporto pri la jaro 2004” plej interesis min, ĉar per ĝi mi pli multe sciis la laboran staton de KELI dum 2004. Pro bona laboro de la estraro de KELI, precipe de nia eksredaktoro Philippe Cousson, ni havis la eblon ĝustatempe legi la revuon. Tie ĉi mi esprimas mian dankon al la estraro de KELI. Samtempe mi bondeziras, ke lerte redaktate de s-ro Åradsson, la revuo pli kaj pli boniĝas.

Nia grupeto, nomiĝas Chengdua Grupeto pri Kristanoj, konsistas el 8 membroj kaj regule aktivadas ĉiumonate unufoje. Nia lernaj materialoj ĉefe estas la revuoj ”Dia Regno” kaj ”Kristana Alvoko”. Ĉar inter niaj grupetanoj kelkaj estas neesperantistoj, do ni plurfoje tradukis la artikolojn el la revuoj en la ĉinan lingvon, por ke ĉiuj anoj komprenu la enhavon.

Nun, mi sendas al vi mian kontribuon ”Bela knabino najbara”, kiu estas mallonga novelo. Mia celo estas, ke per ĝi niaj legantoj distru sin kaj ial ŝatu realan vivon. Kun forta espero, mi volas peti vin korekti kaj alĝustigi ĝin tiel ke ĝi eble taŭgos al la revua stilo.

Estas varmege ĉe nia regiono, suda Ĉinio, temperaturo ofte sin levis super 35°C. Ni laboras ĝenerale en domo kaj ne iras eksteren. Estu singardema kontraŭ someraj malsanoj.

Multajn salutojn al vi. Sincere, ĉina kristano, MU Binghua

# RAPORTO DE LA JARKUNVENO DE K.E.L.I.

Piliscsaba, Hungario (21.07.2005)

Partoprenis la jenaj estraranoj: Philippe COUSSON (prezidanto), Siegfried KRÜGER (kasisto), Els van DIJK (sekretariino), Bengt ÅRADSSON (redaktoro), Zoltan SOMHEGYI, Britta REHM, Irén BAGI, Jacques TUINDER, Pavel POLNICKÝ. Samuel GAILLARD ne povis partopreni pro malsano.

### 1 Malfermo

La prezidanto Philippe COUSSON, malfermis la kunvenon kaj bonvenigis la kongresanojn. Li legis Psalmon 66 kaj ni kantis el ADORU la numeron 501 "Okulojn levas ĉielen mi".

### 2 Elekto de la kunprotokolantoj

Sieglinde STAMM kaj Vera TUINDER sin anoncis kaj la membroj akceptis.

### 3 Fikso de la tagordo

Ne okazis ŝanĝoj

### 4 Komunikoj

Åke AHLRÉN salutis nome de la s-inoj Lilli VIKSTRÖM, Maria HANSEN, Birgitta GUNNARSON. Pavel POLNICKÝ menciis gravan malsanon de Pavel TICHÝ. Li trandonis la salutojn de sia frato Tomáš kaj de la sekretario de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Siegfried KRÜGER salutis nome de Erikas LAICONAS, Larisa KUZMENKO, Grete BURKHARDT.En la listo publikigita en Dia Regno pri la estrara deĵorperiodo mankis la nomo de Jacques TUINDER.

### 5 Funebra remorigo

La jenaj membroj mortis: Usono: s-ino WALTER. Britio: s-ro Arthur GARDNER kaj du asociaj membroj de la brita sekcio s-ro John HARRISON kaj s-ino Doreen HAWKINS. Svedio: s-ino Anna Lisa AHLRÉN. Germanio: s-ino Julie WINTER. Svislando: s-ino Trudi EBERSHOLD. Nederlando: s-ino KRUIS-ANDEL. Dum silenta momento ni rememoris la mortintojn.

### 6 Sekretaria jarraporto

La taskoj de la sekretariino kaj de la kasisto estas ligitaj unu kun la alia ĉar la bankkonto de K.E.L.I. restas en Nederlando; krome nia unuiĝo estas registrita en la nederlanda Ĉambro de Komerco kaj devas obei la nederlandajn regulojn. La membroj aprobis la raporton.

### 7 Kasista jarraporto

La kasisto eksplikis: Esperanto Misio fariĝis fonduso de K.E.L.I. kaj ne plu havas memstaran kason. Erikas LAICONAS el Litovio ĉesis agadi por Esperanto Misio pro aĝo kaj manko de helpantoj. Ni serĉos vojon transporti parton de la materialo al alia adreso. La Biblio estas la plej granda parto de la libroprovizo. Restas ankoraŭ muzikkasedoj de Anjo AMIKA. Ĉu eble la libroservo de UEA povus vendi? La nova presejo en Ĉeĥio estis malpli multekosta ol la presejo en Pollando. La redaktoro kompostadas nian organon Dia Regno. Tiel malplialtiĝis la kostoj.

Nia membraro griziĝas kaj pli junaj membroj malofte aliĝis. Kion fari por atingi pli junan grupon. Jerald VEIT el Usono eldonis la broŝuron "365 Tagoj el la Biblio" kaj K.E.L.I. iom subtenis.

La membroj aprobis la raporton.

### 8 Kaskontrolo

Kaskontrola raporto por la jaro 2004: *"Hodiaŭ la subskribintoj Karl Heinz SCHAEFFER kaj Horst HUB kontrolis afere kaj kalkule por K.E.L.I. la librotenadon de la kasisto, la spezokontojn kaj la*

*bilancon je 31.12.2004. Ili trovis ĉion en bona ordo kaj al ĉiuj demandoj ili ricevis kontentigajn respondojn. Ili rekomdas al la jarkunveno malŝarĝon de la kasisto."*

La membroj aprobis per aplaŭdo.

### 9 Buĝetoj

Ekspliko de la kasisto: la kostoj restis preskaŭ konstantaj. La redaktoraj kostoj iom altiĝis ĉar la redaktoro bezonis novan komputilan materialon. La libroprovizo estas parto de la kapitalo. La Adopta Kaso kaj la Kongresa Helpa Kaso estas ege gravaj. Preskaŭ duonon de la ricevantoj de Dia Regno subtenas la Adopta Kaso. Ili pagis nenion aŭ laŭ eblecoj. Parto de la hungaraj membroj pagis la tutan sumon. K.E.L.I. antaŭpagis monsumon al la antaŭa redaktoro/presisto/eldonisto. Li promesis repagi la restantan sumon de Euroj 1500 fine de la jaro 2005. La membroj aprobis la buĝeton.

### 10 Raporto pri Dia Regno.

Bengt Olof ÅRADSSON fariĝis redaktoro komence de la jaro 2005. Li ankoraŭ serĉas la plej bonan stilon kaj tial aspektis la tri eldonoj de tiu ĉi jaro tre diversaj. La presejo bone presis.

Pavel POLNICKÝ dissendis la Dian Regnon kaj li negocis kun la presejo. Espereble estos la fotoj estonte pli bonaj. La redaktoro strebas al evito de preseraroj. En la biblioteko de Aalen troviĝas la arkivo de Dia Regno. Ĝis la jaro 2004 estis la revuo sendita al la Reĝa Biblioteko en Hago, Nederlando. Tie oni kolektas ĉiujn en Nederlando eldonitajn revuojn sed Dia Regno ne plu estis eldonita en Nederlando ekde multaj jaroj. Ĉu tamen eblus sendi al tiu biblioteko?

### 11 Estrarelekto

Finiĝis la deĵorperiodo de la kasisto Siegfried KRÜGER kaj de la estrarano Pavel POLNICKÝ.

Ili estas reelekteblaj kaj la membroj unuanime aprobis la reelekton. La kasisto estis por la lasta fojo reelektebla. Ni ĉiuj serĉu posteulon. Estas serĉataj novaj estraranoj. La estraro bonvenigas sugestojn. Nova perantino de Bulgario estas Ivanka STOYANOVA, anstataŭ Christo DIMITROV. Ankaŭ la du kaskontrolantoj estis reelektitaj.

### 12.1 Kongresaj planoj -06 kaj -07

La membroj priparolis la jenajn proponojn:

**A.** Rusio: Proponis Larisa KUZMENKO kongreson en Jekaterinburgo en la Uralo. Estas tro malproksime.

**B.** Italio: La Universala Kongreso okazos en Italio sed ni ne havas membrojn en tiu lando kaj tial ne eblas komisii al L.K.K. serĉi kongresejon. Tiu problemo ne estos solvebla. Altaj kostoj estos problemo ĉar multaj el niaj membroj ne povus pagi la kotizon. La ideo ne estis akceptita.

**C.** Rumanio: Maria LÁSZLO proponis organizi K.E.L.I.-kongreson en sia lando (Rumanio) en la urbo Baia Mare, proksime al la landlimo kun Hungario. La propono montris ke la kostoj estus ege altaj. La hotelaj kostoj por unu persono po semajno estos inter Euroj 252 kaj Euroj 399. Ne-konataj estis la luprezoj de la salonoj, rabato, ekskursoj. La propono ne estis akceptita.

**D.** Ĉeĥio: Propono de Pavel POLNICKÝ. Eklezia domo de la Evangelia Eklezio de Bohemia kunfrataro en la vilaĝo Strážné apud Vrchlabi en la nordorienta parto de la Giganta Montaro apud la landlimo kun Pollando. Atingebla buse kaj trajne (3 ½ h. de Prago kun 2 trajnŝanĝoj). Kompleta restado por unu semajno kategorio A (Eŭroj) €110, kategorio B €220/270(1-lita ĉambro). [Pri aliĝkostoj vidu apartan

informilon kun aliĝilo]

Ni konsciis ke la Universala Kongreso okazos en 2006 en Italio de la 29-a ĝis la 5-a de aŭgusto. Tial la membroj elektis por nia kongreso la 12-an ĝis la 19-a de aŭgusto. Laŭ deziro oni jam povos alveni al la kongresejo en la semajno post la Universala Kongreso. Sed oni anoncu sin sufiĉe frue ĉe Pavel. La membroj akceptis la proponon.

Restis la problemo kie estonte organizi kongreson kun pagebla kotizo.

**E.** I.K.U.E. proponis Ekumenan Kongreson en 2007 en Gdansk (Pollando). Invitis la pola I.K.U.E.-sekcio. Proponita estis 22.08.2007 ĝis 29.08.2007. Bedaŭrinde ni ne ricevis pli detalajn informojn i.a. pri kotizo. Ni do ne povis akcepti la proponon kaj ni atendos aldonajn informojn. Krome la dato ne estis akceptita. La membroj preferis pli fruan daton.

Oni esprimis la deziron pri kongresejo kun dormĉambroj kaj kunvensalonoj sub unu tegmento.

[Daŭrigo de la jarkunveno posttagmeze je la 14.30-a h.]

### 12.2 Estrara kongreskotizo

Pasintece partoprenis la prezidanto, kasisto kaj sekretario la kongreson senpage. Dum la jarkunveno de 1988 aldoniĝis la redaktoro. La sama validis por 3 L.K.K.-anoj. Dum la lastaj jaroj pagis la 4 menciitaj estraranoj duonan kongreskotizon pro la pli altaj kongreskostoj. Ofte ekestis kotizproblemoj dum la ekumenaj kongresoj . Tial la estraro proponis:

"La kotizo por la K.E.L.I.-kongreso por funkciuloj de K.E.L.I. (prezidanto, kasisto, sekretario, redaktoro) estu la duono de la kotizo de ties kategorio. Tri L.K.K.-anoj partoprenu senpage. Por ekumenaj kongresoj de I.K.U.E. kaj K.E.L.I. la supre menciitaj funkciuloj de K.E.L.I. pagu sian kompletan restadon kaj la K.E.L.I.-kasisto repagos la duonon al ili." La membroj aprobis.

### 13 Ideoj kaj sugestoj

Iu sugestis ke ni devus iel kontroli la lingvoscion de partoprenontoj al kongreso kaj pli precize peti kontribui en la programo. Ambaŭ ideoj ne estas realigeblaj. Alia sugesto estis demandi per la aliĝilo kiel ni povos kreskigi la membronombron.

Propono de Albrecht KRONENBERGER: K.E.L.I. kaj I.K.U.E. kune noveldonos la Biblion (denove kun la duakanonaj libroj). Pri la formo respondecas Bernhard EICHKORN kaj Albrecht KRONENBERGER. Pri la financoj respondecas la fonduso Max-Josef-Metzger administrata de Bernhard EICHKORN. Pri la kvanto ni devas interkonsenti. La kvanto de la antaŭ 2 jaroj eldonita Biblio rapide malkreskas. Ni konsideru novan eldonon post 2 jaroj. La membroj aprobis.

### 14 Fermo

La prezidanto fermis la kunvenon kaj ni kantis numeron 471 el ADORU "Dum homoj vivas sur la tero".

Protokolanto:
Els van DIJK
Kunprotokolantoj:
Vera TUINDER, Sieglinde STAMM.

Estraro de K.E.L.I.: inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo:

Philippe COUSSON, prezidanto (2007); vic-prezidanto (vakas); Els van DIJK, sekretario (2007); Siegfried KRÜGER, kasisto (2008); Bengt Olof ÅRADSSON, redaktoro ( 2007); membroj: Pavel POLNICKÝ (2008); Zoltán SOMHEGYI (2007); Britta REHM (2007); Irén BAGI (2006); Jacques TUINDER (2007); Samuel GAILLARD (2007)

# MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 5
## Mi estas la bona paŝtisto (Joh 10:11-21)

pastoro Bayo AFOLARANMI

## Enkonduko

> *"Mi estas la bona paŝtisto; la bona paŝtisto demetas sian vivon por la ŝafoj.*
> (Joh 8:12)

La studo de la larĝa teksto (Joh 10:1–21), kiu estas parabolo de paŝtisto–ŝafaro kie Jesuo Kristo deklaris du "MI ESTAS–dirajôojn", estis komencita pasintfoje. La dua diraĵo estos diskutata en ĉi tiu parto.

## La dua deklaro

(versikloj 11–18)

Demonstrinte la fakton ke Li estas la pordo de provizo, protekto kaj savo de la ŝafoj (versikloj 7–9), Jesuo Kristo deklaris kaj emfazis, "*Mi estas la bona paŝtisto*" (versikloj 11 kaj 14). Krom la unua kialo, Li donis tri aliajn kialojn por esti bona paŝtisto:

1— Li demetis Sian vivon por la ŝafoj (versikloj 11 kaj 17). Estis danĝeroj de sovaĝaj bestoj kiuj atakis la ŝafaron kaj eĉ la paŝtiston. Bona paŝtisto estus preta riski sian vivon por la ŝafoj. La kazoj de Jakob kaj David estas bonaj ekzemploj ĉi tie (Gen 31:38–40; 1 Sam 17:34–35). Dungito eble ne faras tion ĉar lia ĉefa zorgo estas lia salajro (versikloj 12–13). Jesuo Kristo venis kiel nia Paŝtisto por doni Sian vivon por ni, kaj Li donis ĝin (versikloj 11, 17–18; Gal 1:4; Efe 5:2 kaj 25; Heb 9:14). En versiklo 18, Jesuo Kristo diris al ni ke Li faris ĉi tion volonte; neniu perfortis Lin fari ĝin (vidu: Heb 10:9–10).

2— Li konas Siajn ŝafojn (versiklo 14) La antikva Proksim–Orienta paŝtisto konis ĉiun de siaj ŝafoj laŭnome. Li prizorgis ilin unuope, ne nur kiel aron. Ne mirinde, la paŝtisto en la parabolo de Jesuo sciis ke iu ŝafo perdiĝis kaj li forlasis la ceterajn por serĉi ĝin (Luk 15:3–7). Ĉi tio estas en kontrasto al la nuntempaj okcidentaj paŝtistoj kiuj traktas kun la ŝafaro entute. Jesuo Kristo konas Siajn ŝafoj, kaj Liaj ŝafoj konas Lin. Paŭlo atestis ĉi tion: La Sinjoro konas tiujn, kiuj estas Liaj (2 Tim 2:19). Ĉu Jesuo konas vin?

> *"Mi estas la bona paŝtisto, kaj mi konas la miajn, kaj la miaj min konas"*
> (Joh 10:14)

3— Li alkondukos aliajn ŝafojn al Sia gregejo (versiklo 16) Jesuo Kristo sciis ke estas aliaj ŝafoj – la ne–Judoj – kiuj ne estas de la enfermejo – Judaismo. Kiel Li elvokis Siajn ŝafojn – la Judajn disĉiplojn – el la enfermejo, Li promesis alkonduki aliajn al Sia gregejo – Kristanaro, por ke estu "unu

grego, unu paŝtisto.” Li ankoraŭ plenumas ĉi tiun promeson hodiaŭ. Ĉu vi estas alkondukita al Lia grego?

### La reago de homoj

(versikloj 19–21)
Kiel la homoj respondis al aliaj “MI ESTAS–diraĵoj,” ili estis dividitaj. Ili pridubis Lin. Ili malakceptis Lin. Ili ne akceptis Lin kiel la Pordon, kaj sian Paŝtiston.

### Konkludo

Kiel ni vidis ke la estroj de la Malnova Testamento estis aluditaj kiel paŝtistoj, se vi estus estro, sciiĝu ke vi estas paŝtisto. Kia paŝtisto vi estas? Ĉu vi estas malbona paŝtisto kiel kelkaj estroj Izraelidaj (Jer 23:1–2; Jeĥ 34:1 ss), aŭ bona paŝtisto kiel Jesuo Kristo? Ĉu vi estas preta demeti vian vivon por aliaj (vidu: Joh 15:13)? Ĉu Jesuo Kristo konas vin kiel unu el Siaj ŝafoj? Ĉu vi aŭskultas Lin? Ĉu vi ankoraŭ dubas en via animo pri ĉi tiuj “MI ESTAS–diraĵoj”? ☙

---

## Feriaj kursoj en Instituto ZAMENHOF

En julio kaj aŭgusto gelernantoj kaj instruistoj lernis en Instituto ZAMENHOF (IZo). De la 25-a de julio ĝis la 26-a de aŭgusto 239 infanoj kaj junuloj lernis en IZo kadre de la feriaj kursoj. Al la gelernantoj estas disponigitaj lecionoj pri la franca, angla, matematika kaj fizika sciencoj. Sep instruistoj gvidis la kurson sub la kontrolo de ATTIOGBE-AGBEMADON B. Mensah, GBEGLO Koffi kaj SAGBADJELOU Kokou.

Fine de la kurso okazis ekzameno, kiu ebligis disdoni premiojn al la plej bonaj gelernantoj. La kursoj okazis nur matene. Tiel posttagmezojn devis okupi alia kurso. Instruistoj de IZo lernis kaj ekzameniĝis en Esperanto.

De la 22-an de augusto ĝis la 1-a de septembro 2005 okazis kursoj por komencantoj en Instituto ZAMENHOF. Al kvin IZo-laborantoj aldoniĝis sep aliaj homoj por lerni Esperanton laŭ la libro metodo 11 kaj Zagreba Metodo. S-ro KOUEVI Togbe Basile instruis ilin. Iom da vortoj pri la historio de Esperanto en Togolando kaj cetere en la mondo estas disponigitaj al la gelernantoj.

La 2-an de septembro 2005 okazis la ekzameno A de TIETo (TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando). Ok el dek kandidatoj sukcesis. La ekzamenon gvidis s-roj ATTAGLO Elom kaj DOUMEGNON Koffi.

GBEGLO Koffi, B. P. 13169, Lome, TOGOLANDO

skribante retmesaĝon al mi, bonvolu uzi mian kompletan retadreson: esp.togo@cafe.tg

LA PROFILO


# LA PLEJ NOVA ESTRARANO

Samuel GAILLARD, FR

**Mi ŝatus rakonti** al vi kelkajn momentojn de mia vivo. Mi naskiĝis en la jaro 1959. Mia patro estis pastoro de la Asembleoj de Dio (pentekostanoj), kaj mia patrino estis instruistino. Kiam mi estis 7-jara, mi konstatis ke Dio estas la plej forta, kaj mi deziris esti je Lia flanko; kiel knabo, mi preferis la flankon de la gajnanto al la alia. Infana fido, sed la unua paŝo, konfirmata iom post iom dum la jaroj. Mi petis la bapton kiel 15-jara, kaj kelkajn jarojn poste mi organizis skoltan evangelian grupon kune kun mia fratino.

**Mi iĝis instruisto** por geknaboj. Mia patro, kiu mortis en 1984, havis bonajn rilatojn kun la diversaj komunumoj de nia urbo Clermont-Ferrand [Klermon-Feran] en Francio. La gepatroj de la geskoltoj de nia skolta grupo estis en tiuj diversaj komunumoj, kaj mi daŭrigis la bonajn rilatojn.

**En 1987, mi edziĝis** kaj, antaŭ la alveno de la beboj, ni, Pascale [Paskal] kaj mi, decidis havi komunan hobion: lerni Esperanton! Por mia edzino tiu ideo estis nova, sed mi havis kelkajn informojn dank'al unu el miaj profesoroj (30-sekunda prelego pri Esperanto!), dank'al unu komunumanino de mia patro (emerita instruistino, kiu renkontis Lidia Zamenhof) kaj dank'al kelkaj gazetaj artikoloj. Ni sekvis 3 aŭ 4 kurs-horojn kaj ĉefe ni aĉetis Esperantan Biblion. Ĵus antaŭ dormiĝo, ni kutimis legi versiklon de la Biblio franc-lingve; nun ni legis dufoje la saman versiklon: france kaj Esperante. Post 3 aŭ 4 monatoj ni komprenis ĉion.



**En septembro 1988**, mi komencis korespondi kun Esperantaj geskoltoj kaj ni organizis plurajn aranĝojn aŭ en aŭ ekster Francio kun diversnaciaj geskoltoj: italaj, hispanaj, ĉeĥaj, hungaraj ktp. Mi zorgis pri tiu skolta grupo dum 20 jaroj: la dek unuajn jarojn sen Esperanto, kaj ni vojaĝis tra Francio tendumante kun francaj geskoltoj; la dek sekvantajn jarojn kun Esperanto, kaj ni vojaĝis tra Eŭropo tendumante kun eŭropaj geskoltoj.

**Dum tiu periodo,** mia edzino kaj mi naskis du filinojn kaj laste filon. Hejme ni parolas 4 lingvojn: la francan, la Esperantan, la anglan kaj la germanan. Pliekzakte, ni uzas la Esperantan dum 2 semajnoj, poste ni ŝanĝas por uzi la anglan dum 2 semajnoj kaj ankoraŭ ni ŝanĝas por uzi la germanan dum 2 semajnoj. Ni uzas la francan kiam ni ne scias paroli en la "lingvo de la semajno". Tiamaniere, niaj gefiloj bone komprenas Esperanton, sed ni havas problemojn por paroligi ilin: "Paĉjo kaj Panjo komprenas la francan, do kial strebi sin por paroli fremdan

lingvon?" Se vi trapasas nian regionon, ne hezitu halti ĉe ni: vi helpos nin paroligi niajn gefilojn en la Internacia Lingvo!

**Mi aliĝis al** Franca Evangelia Esperanto-Ligo tre frue. Mi partoprenis mian unuan KELI-kongreson en Ĉeĥio 2004, kaj mi ĝojis sperti la etoson de Esperanta renkontiĝo kaj la kvaliton de kristanaj interŝanĝoj. Por mi tia semajno estas tre edifa. Eble mi renkontos vin dum la venonta kongreso. ☙

---

# Jen estas la vojo

Elmer ESCOTO

Kiam oni vojaĝas kaj perdiĝas, oni kutime haltas ĉe benzinstacio kaj petas direktojn. Espereble, la homo kiu donis al vi direktojn sciis pri kio li parolis. Sed teknologio ŝanĝas tion.

La entrepreno Rockwell International produktis sistemon nomatan PathMaster, kiu uzas sateliton ne nur por sendi direktojn al aŭtomobiloj, sed ankaŭ permesi al la uzanto havi informojn pri proksimaj restoracioj kaj hoteloj. Etak Inc. ofertas similan programon, sed krom vojaĝ–direktojn, ĝi donas al la vojaĝanto informojn pri la survoja cirkulado, kaj se necese, donas ankaŭ direktojn al alternativaj vojoj. Tiu sistemo kostas ĉirkaŭ 3000 usonajn dolarojn (2500 eŭrojn).

Tamen Jesaja parolas pri gvid–sistemo por kiu ne necesas ekstraj ekipaĵo aŭ mono. Oni nur bezonas koron percepteman al la kvieta voĉo de Dio.

Dio ĉiam zorgis pri la direkto kiun la homaro prenas. Kiam li pridemandis Adamon en Edeno *Kie vi estas?*, li sciis, ke Adamo deviis de la ĝusta vojo. Kiam la Izraelidoj lasis la landon Egiptan, li donis al ili fumkolonon dum la tagoj kaj fajrokolonon dum la noktoj. Por ke ili ne perdu la direkton. Jesaja konfesis, ke la homoj tiutempaj *kiel ŝafoj, ĉiu iris sian vojon*. Sed Dio ne forlasis ilin.

---

*Kaj kiam vi dekliniĝos ĉu dekstren, ĉu maldekstren, viaj oreloj aŭdos vortojn diratajn malantaŭ vi: Jen estas la vojo, iru laŭ ĝi.*
(Jesaja 30:21)

---

Male, li ofertis doni al ili gvidon.

Se vi bezonas la Dian gvidon hodiaŭ, certiĝu ke via koro estas en paco kun Li. Tiam pretendu Lian promeson. Se vi aŭskultos la voĉon de Lia Spirito, Li gvidos vin tra la tuta vojo de via vivo. Li montros al vi la vojon. Ĉu vi paŝos sur ĝi?

Se vi volas koni la Dian vojon, vi devas aŭskulti Lian voĉon. ☙

# Informetoj

## Koresponddeziroj

Elizabeth MILLER,
415 Argyle Rd Apt. 1R,
Brooklyn NY 11218-5427,
Usono

deziras korepondi. Ŝi estas 59-jaraĝa sekretariino (fraŭlino) kaj membro de la "Unity" eklezio. Ŝi interesiĝas pri poezio, aŭskulti muzikon, la pacmovado kaj pri la kulturoj de Japanio, Koreio , Ĉinio

Saluton! Mi estas 32-jara esperantisto el DR Kongo, sed nuntempe mi loĝas en NYARUGUSU rifuĝejo, en Tanzanio kaj estras Kristanan Eklezion landskale (EMD/DR Kongo).

Per ĉi tiu letero mi petas vin kontaktigi min kun tieaj verdstelanoj por sincera kaj longedaŭra korespondado.

Varmajn leterojn el diversaj geamikoj tieaj-membroj de via E-grupo-atendante, mi korkore kaj kristane salutas vin,

Past. BUKURU R.NABAHENA.
(Mia UEA-Kodo:buna-b)

**Estimataj gesinjoroj,**

Por la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj komenciĝos nova fazo. Ni transloĝiĝos en la sekvaj semajnoj al pli taŭga kaj multe pli facile alirebla loko. Temas pri nove restaurita palaco en la centro de Vieno, tute proksime de la nuna situo. Jen ĝia adreso:

Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo:
Palais Mollard
Herrengasse 9;
1010 Vieno; Austrio


Ni ankaŭ havos novajn deĵorajn horojn, kiuj validos nur ekde la remalfermo en novembro:

Esperantomuzeo:
- lun. – merkr. 10h00 – 14h00
- ĵaŭde 15h00 – 19h00
- vendr. – sab. 10h00 – 14h00

Kolekto por Planlingvoj:
- lun. – merkr. 09h00 – 16h00
- ĵaŭde 12h00 – 19h00
- vendr. 09h00 – 16h00

Sed bonvolu direkti ĉiujn sendaĵojn al la sekva adreso :
Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo:
Josefsplatz 1;
1010 Vieno; Austrio

Kathrin DELHOUGNE



# Arthur Henry Gardner (1920 - 2005)

Multaj KELI membroj, aparte tiuj en nia Brita Sekcio, bedaŭros aŭdi pri la granda perdo kiun ni spertis pro la forpaso de nia kara amiko kaj frato "Arturo" Gardner.

Arthur naskiĝis la 9-an de februaro 1920 en London, kaj komencis post siaj lernejaj jaroj vivlongan karieron en komunikada industrio. Dum la milito, li estis telegrafisto en la Reĝa Aer-Armeo, servante en Gibraltaro.

Inter multe da interesoj estis lingva komunikado, pro kiu li lernis la francan lingvon, poste la germanan, kaj plu poste Esperanton kiun li tre favoris. La Esperanto Movado profitis pro la diversaj talentoj kiujn Arthur posedis kaj uzis por sia kaj alies plezuro.

En la Aer-Armeo li ludis la kontrabason en orkestro kaj post la milito tion li faris ankaŭ en aliaj orkestroj. Ĝuante ankaŭ kantadon, li kantis en ĥoroj kaj estis entuziasma membro de la Londona Esperanto-Ĥoro.

Kiel kristano, Arthur apartenis al la loka Baptista Preĝejo, kiun li fidele servis, do lia fido gvidis lin al la kristana flanko de Esperanto. Aliĝinte al KELI antaŭ pli ol tridek jaroj, li partoprenis multe da ĝiaj naciaj kaj internaciaj aranĝoj - diservoj dum kongresoj, niaj propraj KELl-kongresoj kaj aparte en la regula monata Esperanta Diservo Londona. En la Londona diservo li estis sekretario inter 1983 kaj 1985.

Arthur edziĝis al Mary en 1948, kaj al ili naskiĝis kvar infanoj - filo Derek kaj filinoj Marion, Heather kaj Christine. Ili tre ĝuis sian familian vivon, spertante kreskantan plezuron kun genepoj kaj nun tri infanoj en plua generacio.

Post monatoj de malsaniĝo, Arthur mortis la 28-an de aprilo 2005 en la loka hospitalo en Peterborough kien li transloĝiĝis post emeritiĝo kaj vivado en Londono.

Al la familio de "Arturo" ni sendas niajn sincerajn kondolencojn.

Tom Neil

# Kantiko de la kreitaro

Sankta Francisko el Asizo
El la originalo tradukis d-ro Endre DUDICH, HU

Plej alta, ĉiopova kaj bona Sinjoro:
vi indas je laŭdo, gloro, honoro, kaj ĉiu beno.
Vi sola tiujn meritas, kaj nenia homo indas nomi vin.

Laŭdata estu Dio, mia Sinjoro, per la tuta kreitaro speciale
per nia frato, majstro SUNO, kiu varmigas kaj lumigas ĉion:
li estas bela kaj brile radianta, portanta vian vizaĝon, Sinjoro.

Laŭdata estu mia Sinjoro per la LUNO kaj per la STELOJ:
vi igis ilin klaraj kaj belaj en la ĉielo.

Laŭdata estu mia Sinjoro per nia frato VENTO, per l'aero,
la nuboj kaj ĉia vetero: per ili vi subtenas viajn kreitaĵojn.

Laŭdata estu mia Sinjoro per nia fratino AKVO,
kiu estas tre utila, humila, valorega kaj pura.

Laŭdata estu mia Sinjoro per nia frato FAJRO, per kiu
vi lumigas la nokton: bela li estas kaj gaja, potenca kaj forta.

Laŭdata estu mia Sinjoro per nia patrino TERO, kiu vivtenas kaj
protektas nin: ŝi produktas fruktojn, kolorajn florojn kaj herbojn.

Feliĉaj estas, Sinjoro, kiuj pro via amo pardonas al la aliaj,
kiuj suferas malsanon kaj ĉiun doloron.

Feliĉaj estas, kiuj pacience toleras la mizeron ĉi-teran,
ĉar ili ricevos de vi kronon eternan.

Laŭdata estu mia Sinjoro per nia frato la korpa MORTO,
kiun neniu homido povas eviti:
ve al tiu, kiun la lasta minuto trovas en morta peko.

Feliĉaj estas, kiuj akceptas vian volon sanktan:
la dua morto ne trafos ilin.

Laŭdegu la Sinjoron, ĉiuj aroj teraj kaj ĉielaj,
bendiru kaj humile servu al Li.